



Januaro 2017

Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)

No.13 / 01.01.2017

Enkonduko pri Oomoto

La instruoj de Oomoto

La Realeco de la Spirita Mondo

La mondo, en kiu ni vivas ĉiutage, estas “fenomena mondo”, dum la vola koncepta mondo estas postmorta mondo nomata la “spirita mondo”.

La vera esenco de homoj estas animo (tamašii), kaj dum ni vivas en la fenomena mondo, kie la animo kunfandiĝas kun nia metieria korpo. Post la morto, la animo foriras el la korpo, kaj vojaĝas al la spirita mondo.

La animo estas senmorta

Nia animo origine estas unu parto de la Dio, kaj ĝi estas dia spirito partita de Dio. Dum nia animo vivas en la fenomena mondo, Ĝi kreskas kaj evoluas.

Tamen laŭ nia maljuniĝo, la fizika korpo kun jaroj malfortiĝas, kaj fine koro kaj pulmoj nefunkciiĝas. Kaj al homo venas la morto. Kvankam la fizika korpo mortas, la animo forlasinta la korpon estas senmorta, kaj eterne vivas en la spirita mondo.

Al diversaj Spiritaj Mondo

En la spirita mondo, samekiel en la fenomena mondo, troviĝas lumaj kaj belaj lokoj, kaj ankaŭ estas mallumaj kaj malbelaj lokoj. Laŭvice de la proksimeco de la Diaj varmo kaj lumo, estas tri spiritaj mondoj: ĉiela regno, intera regno (purgatorio), kaj infero. La ĉiela regno estas la plej luma, la plej varma, la plej pura kaj la plej bela en la mondo. Tie la animoj de veraj dioj kaj puraj homoj loĝas en paco. Kontraŭnivele infera regno estas la plej malbela, la plej malluma kaj la plej malpura en la spiritaj mondoj, kaj tie kolektiĝas animoj de malbonaj dioj kaj popoloj, kies koroj havas malbojn dezirojn kaj falsecon. Inter tiuj du mondoj kuŝas la intera regno purgatorio.

Post la morto multaj animoj iras al la intera regno. De tie, depende de persono koro kaj ago dum lia dumviva tempo, kaj depende de la stato de lia animo, li iros al la adekvata spirita mondo.

La samon skribas DEGUĈI Onisaburo: “Tiu, kiu kredas la Dion, facile atingas la ĉielan regnon, kaj malfacile falas en la inferon.” Ni propre ricevas la belan spiriton de la dio, kaj tiuj animoj, kiuj vivas vivon rekte ligitan kun Dia koro, iros al la ĉiela regno kaj fariĝos ĉielregna loĝanto post la morto.

Introduction about Oomoto

The Teachings of Oomoto

The Reality of the Spiritual World

The everyday world we live in is the “phenomenal world”, while the volitional/conceptual world and the world after death are called the “spirit world”. The true essence of humans is the soul (tamashii), and while we live in the phenomenal world that soul is merged with our fleshly bodies. After death, the soul leaves the body, and journeys to the spirit world.

The Soul is Immortal

Our souls are originally a part of the Divine spirit shared with us by God. As our souls live in the phenomenal world, they grow and develop.

However, as the years add up, the physical body ages and ultimately the heart and lungs stop. And so we humans come to face death. While our physical body dies, the soul that has left the body is immortal, and carries on living eternally in the spirit world.

To the Various Spirit Worlds

In the spirit worlds, just as in the phenomenal world, while there are bright and beautiful places, there are dark and dirty places as well. In order of proximity to God’s heat and light, there are three spirit worlds: the heavenly realm, the intermediate realm (purgatory), and hell. The heavenly realm is the brightest, warmest, cleanest and most beautiful of the worlds. There the souls of true gods and pure humans dwell in peace. At the opposite level, the realm of hell is the ugliest, darkest and dirtiest of the spirit worlds, and there gather the souls of evil deities and people whose hearts harbor ill desires and falsehoods. Between these two worlds lies the intermediate realm of purgatory.

After death, most souls proceed to the intermediate realm. From there, depending on that person’s heart and actions during their lifetime, and the state of their soul, they will move on to the appropriate spirit world.

Just as Onisaburo Deguchi wrote “Those who follow the path find it easy to ascend to heaven, and difficult to drop to hell”, we have originally received a splendid spirit from the divine, and those souls that live a life in alignment with God’s heart will go to heaven and become heavenly beings after death.

Copyright (C) 2017 Jinrui Aizenkai-ULBA (Universal Love and Brotherhood Association)
All Rights Reserved.

Ten'on-kyo, Kameoka, Kyoto, Japan 621-8686

<http://www.jinruiaizenkai.jp/> <http://www.oomoto.or.jp/>



Januaro 2017

Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)

No.13 / 01.01.2017

Diaj Revelacioj

La 19-an de aŭgusto (luna) en la 1-a jaro de Tajŝoo (1912)

Se Mi ankoraŭ plu klopodos por ŝanĝigi la koron al tiaj garddioj, kiuj ne povas kompreni, kion ajn Mi diras, la homoj en la tuta mondo havos pli kaj pli grandan suferon kaj finfine eniros en sakstraton, ankaŭ la militoj ne malaperos kaj la mondo falos en suferegon sen realiĝo de Dia plano. Jen tial Mi avertis ĝis nun tiom ofte, ke viaj oreloj tediĝis.

Se ies dikredo survoje ŝanĝiĝas, tio ja pruvas ke ties animo ne havas la originan ligilon kun Mi. La animo, ligita kun Mi, neniam povas rompi la ligilon, kiom ajn li klopodas, kaj ne sentas tiom grandan suferon, kia ajn malfacileco trafas lin. Tiom profunda estas la rilato inter Dio kaj homo (aŭ homa natura karaktero).

La ĉi-foja ne estas simpla milito inter popoloj. Se ili sufiĉe batalos, la elspezo de mono kaj la malmultiĝo de homoj estos senlimaj. Sed, ĉar ambaŭ ŝipoj jam ekveturis, ili jam ne povas reveni; ili iros ĝis la fino.

En ĉi tiu Fudesaki Mi ofte skribas, ke oni devas sufiĉe rikolti kaj konservi manĝaĵon. Ne havu malatenton, eĉ se nun troviĝas rizo.

Ĉi tiu Fudesaki sciigas la okazontaĵojn en la mondo, dum ankoraŭ tute ne troviĝas iliaj signoj. Se vi dubas, vi poste tre bedaŭros. La pento malfrua neniom utilas.

Diaj Revelacioj de Oomoto el sep volumoj.

Unu el du bazaj sanktaj skriboj de Oomoto. Kvankam analfabeta, Fondintino Nao aŭtomate (psikografie) skribadis la vortojn de Dio Uŝitora en la stato de la Diposedo. Ĝia enhavo konsistas plejparte el rondaj kanaoj (Hiragana) kaj la kvanto atingis 200,000 foliojn da japanaj paperoj en la daŭro de 27 jaroj. Majstro Onisaburo redaktis ĝin, aldonante ĉinajn literojn (Kanĵi) kaj publikigis kiel la bazan sanktan skribon "Diaj Revelacioj de Oomoto (Oomoto-Ŝinju).

Divine Revelation

August 19, 1912

Even if Ookunitokotachi-no-Mikoto manifests Himself now, there is no soul that can be useful to Him; how blurred they have been! But Kami shall not mind. He will have to expedite everything and set to rebuilding, for it is a problem of vital importance to all the wide world.

If He is long concerned with tutelary angels who are not sensible, all the people in the world will suffer and come to a deadlock, with the war not yet finished nor the coup de grace given.

Should anyone of you change your minds about loving Him, it is because you are not predestined after all; spiritual connections can not be cut off and those who are predestined shall not feel much trial no matter what miserable plight they might be thrown into.

The War to come shall not be one between countries. It shall be the great war between the Kingdom of Heaven and the Devils - Devils against Kami - their terrible scheme may be beyond the reach of the people, but shall be no match against the Deathless Original Spirit. When they have fought enough there will be no help for it by spending even more money and no way of counting all the last people. Yet things are, as it were, outgoing ships - ships on either side will not be able to turn aside, and thus will reach the extremity.

Has He not repeatedly told Nao DEGUCHI to preserve provisions? Never be off guard even though there is plenty of rice.

These Scriptures shall make world affairs known before there is a sign of their occurrence, so it will be too late if you doubt them now.

Divine Revelation (Sacred Texts of Oomoto). Seven volumes in total.

Although the Foundress Nao was illiterate and could neither read nor write, while visited by the spirit of Divine Ushitora she began recording his words using automatic writing. Writing almost entirely in the hiragana syllabary, Nao transcribed the "Ofudesaki" (the Tip of the Brush) on over 200,000 sheets of paper, working on it for 27 years until her passing.



Januaro 2017

Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)

No.13 / 01.01.2017

Diaj Vojsignoj

Ĉapitro 2

107. La suno kaj la luno, ĉiu estaĵo en la mondo, ĉiuj troviĝas en la sino de DIO AMENOMNAKANUŜI.

108. Senlima estas la forto de DIO AMENOMINAKANUŜI. Kaj senfina estas Lia agado en kalejdoskopa ŝanĝiĝo. Do, loko, kie ne ekzistas ĉi tiu Dio, estas nenie en la universo.

109. Dio regas la universon ŝanĝiĝante en diversajn formojn. Origine, Dio estas ununura, sed Li disdividas Sian korpon en kelkdek milionojn por gardi kaj evoluigi la mondon.


110. Dio ĉiele elektis la Spiriton de Mizu, kaj min malsuprenigis kiel la serviston de Dio, por konstrui Dian regnon kaj por disvastigi la sanktajn forton kaj potencon de Dio tra la mondo.

111. En la pratempo, la Spirito de Mizu, alinome Dio Susanoo, aperis kiel la savanto de ĉi tiu mondo. Kaj li sola ŝarĝis sin per diversaj pekoj de la ĉielo kaj la tero. Kaj li savis la mondon. Opinii Dion Susanoo kruelega (laŭ japana mitologio) ja estas afero pekbara kaj malpia. Ĉi tiu estas la Dio, kiu ankaŭ nun daŭre savadas homojn el malfeliĉoj. Ĉi tiu Dio elaçetas homojn, prenante sur sin ties pekojn, kiom ajn gravaj ili estas.

112. Jen venas la tempo, kaj ĉi-foje Dio malsuprenigis surteren la Spiriton de Mizu kiel savanton, por realigi Dian regnon. Dio savos la mondon, ŝarĝante la Spiriton de Mizu per amaso da pekoj de la mondo.

113. Tiun, kiu kredas ke la Spirito de Mizu estas vera savanto, Dio favoros per ĉia ajn forto kaj favoros per senlimaj trankvileco, ĝojo kaj eterna vivo.

Diaj Vojsignoj estas sankta libro, verkita de Majstro DEGUĈI Onisaburo, Kunfondinto de Oomoto (1871-1948). Plenigita de la Dikaraktero de la Spirito de Mizu, li skribis en 1904, kiam li estis 33-jaraĝa, en Ajabe, en la gubernio Kioto, Japanio.



“Diaj Vojsignoj” internacia eldono

Divine Signposts

Ĉapitro 2

107. The sun and the moon and all things in the world are all in the lap of the GOD AMENOMINAKANUSHI.

108. The power of the GOD AMENOMINAKANUSHI is boundless. Boundless also is His ever-changing activity. There is no place in the universe where this God is not present.

109. God governs the universe, changing into various forms. Originally, God is one and only, but He divides His body into tens of millions in order to protect the world and allow it to develop.

110. In heaven God chose the Spirit of Mizu, and sent me down as His servant, to build a Divine kingdom and to spread the sacred power and authority of God throughout the world.

111. In ancient times, the Spirit of Mizu, the God Susanoo, appeared as the saviour of this world. Alone he took upon himself the various sins of heaven and earth, and saved the world. To regard the God Susanoo as a fierce and cruel god (in accordance with Japanese mythology) is indeed a sinful and impious thing. This is the God who even now continues to save human beings from misfortune. This God redeems human beings, taking upon himself their sins, however grave they may be.

112. The time is at hand, and now God has sent down to earth the Spirit of Mizu as saviour, to bring about the Divine kingdom. God will save the world, loading the many sins of the world onto the Spirit of Mizu.

113. God will favour with any power those who believe that the Spirit of Mizu is a true saviour, and He will grant them limitless tranquillity, joy and eternal life.

Divine Signposts is a sacred text written by Onisaburo DEGUCHI, the Co-Founder of Oomoto (1871-1948). Imbued with the divinity of the Spirit of Mizu, he wrote it in 1904, at the age of 33 years, in Ayabe, Kyoto Prefecture, Japan.



Januaro 2017

Oomoto Internacia


(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)

No.13 / 01.01.2017

Esplorado de Vivĝojo

1. Deziro esti feliĉa

Bonoj de sperto



“Esplorado de
Vivĝojo”
Hidemaru Deguchi

Finfine la plej valora por la homa vivo estas sperto. Ju pli severajn, ju pli abundajn spertojn homo havas, des pli li iel brilas kaj aplombas. Homo povas fari ion vere valoran, nur post kiam li trapasis diversajn situaciojn.

Do por ni dankinda estas ĉio, kion ni faras, aŭ kion ni estas devigataj fari.

Homoj volonte spertu humilajn servadojn al laiaj, kaj tio utilos al ili eĉ pli ol legado de milionoj da libroj.

La vera proprieto de homo estas nur liaj spertoj, lia luminiĝo per spertoj.

Faru sian plejblon

Por ion fari, ne atendu nur helpon de gvidanto aŭ libro. Frontu al ĝi, pensante ke ĉio alia krom “mi” mem, estas nur sugestanto.

Nenio fariĝas mia propraĵo, se mi mem ne interesiĝis kaj prizorgis por ĝi.


La intereso de vivo estas en la ĝojo, ĉiam ion elpensi, ion eltrovi kaj ion krei, sendemande pri la situacio de tiu homo.

“Esplorado de Vivĝojo” estas libro verkita de la Tria Kungvidanto DEGUĈI Hidemaru (1897-1991). Ĝin ni kompilis el “Memornotoj de mia kredado” de li el 8 volumoj, kiuj konsistas el la frazoj elĉerpitaj el liaj taglibroj de liaj studentaj tagoj.

In search of Meaning

1. The Heart in Serch of Happiness

The Virtue of Experience



“In Search
of
Meaning”
Hidemaru
Deguchi

After looking at matters from every angle, I have come to believe that the most valuable thing in our lives is experience gained. Those who have had deep or broad experiences are somehow radiant and self-composed. We cannot accomplish anything until we have gone through the various vicissitudes of life.

In this sense, whatever we are doing or being made to do is blessed and all to the good.

We should voluntarily undertake demeaning work. This will truly be of more benefit in the end than reading a whole library of books.

True wealth is experience and understanding alone.

Doing One's Best

You must not be too dependent on your teacher or on books. You must confront the subject on your own, looking upon everything else as reference.

Nothing will truly be yours unless you take a personal interest in it and work it out on your own. You must keep this principle in mind even when dealing with trifling matters.

Joy in living means taking delight in inventing, in discovering, and in creatin something ceaselessly. It has nothing to do with the particular conditions under which we live.

“In Search of Meaning” is a book written by Hidemaru Deguchi (1897-1991). This book is the excerpt from the diary Hidemaru kept writing when he was a university student. It was a little compiled from the original text in order to focus on the general readers.



Januaro 2017

Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)

No.13 / 01.01.2017

Ĵinrui Aizenkai

**Tri Principoj krei Eternan Mondpacon;
Unu Dio, Unu Mondo kaj Unu Interlingvo**

Kunlaboro de Religioj (Unu Dio)

Onisaburo Deguĉi predikis: "Por alvenigi pacon kaj feliĉon al la homaro, harmonio de popola menso estas antaŭkondiĉo kaj por tio la tuta homaro devas unuigi sub la instruoj de la Kreinto." Li ankaŭ diris: "Por unuigi la mondon, se oni uzos la militan potencon aŭ aŭtoritaton, malpaco ne finos. Ni ne povas alvenigi eternan pacon." Religiaj gvidantoj devas preĝi kune kaj labori kune por paco.

Mondfederacio (Unu Mondo)

Onisaburo Deguĉi predikis: Ni devas forigi videblan baron (ekstere direktita milita armilaro) kaj nevideblan barieron (malamikeco inter nacioj kaj rasoj kaj ankaŭ la malamikecon inter religiaj grupoj) por krei mondpacon. Ĵinrui-Aizenkai celas promocii religiajn kunlaborojn kaj forigi nevideblajn barierojn, kaj harmoniigi popolajn korojn kaj krei la Mondfederacion por fari la sistemon malhelpi militon per leĝoj.

Esperanto (Unu Interlingvo)

Onisaburo Deguĉi adoptis Esperanton por informi la idealon de universala amo jam de la fondiĝo de Ĵinrui-Aizenkai. Diferenco de lingvoj estas granda baro por la homaro. Internacia lingvo Esperanto rompas tiun baron. Esperanto solvas la lingvajn problemojn de ĉiu raso, kaj de la interkulturaj kampoj; ĝi peras personojn de malsamaj rasoj.

Jinrui Aizenkai

**Three Columns to create Eternal World Peace:
One God, One World and One International Language**

Cooperation of Religions (One God)

Onisaburo Deguchi preached: "In order to bring about peace and happiness to the humanity, harmony in people's mind is prerequisite and for this all humanity should join their efforts together and carry out their workings of heaven and earth." He also said: "To unify the world, if one uses the military power or authority, strife will not end. We cannot hope to bring about eternal peace." Religious leaders should pray together and work together for peace.

World Federation (One World)

Onisaburo Deguchi preached: We must remove tangible barrier (externally directed military armament) and intangible barrier (hostility between nations and races and also the hostility between religious groups) to create world peace. Jinrui Aizenkai aims to promote religious cooperation and remove intangible barrier, and harmonize people's heart, and to create the World Federation in order to make the structure to prevent war by legal power.

Esperanto (One international language)

Onisaburo Deguchi adopted Esperanto to inform the ideals of universal love from the start of Jinrui Aizenkai. Difference of language is a large barrier for humanity. International language Esperanto breaks through this barrier. Esperanto values the language of each races, and on the stages of the cultural exchange, it mediates between people from different races.



Januaro 2017

Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)

No.13 / 01.01.2017

NOVAĴO

La Delegitoj al la 35-a Preĝo porpaca en Havajo

Rerigardinte la estintecon, ni konstatis malfermi la pordon al la estonteco.

Krei la mondpacon per la kunlaboro inter Japanio kaj Usono.

La membroj de la Japana Religiula Komitato de la Mondfederacio, kies prezidanto estas Cunekiyo Tanaka, la Ĉefo de Ŝintoisma Sanktejo Iŭaŝimizu, partoprenis en ĝi el Japanio.

De la 5-a ĝis la 9-a de decembro, 2016, al la 35-a Preĝo porpaca en Havajo estis sendita la delegacio de la Komitato konsistanta el 33 membroj. Ĝin aliĝis S-ro Haĵime Macuda, la Ĉefo de Oomoto-Centro en Kameoka, Japanio.

2015 estis la jaro 75-a, tria kvarono de jarcento, depost la ekokazo de Pacifika Milito komencita de la atako de Japana Mararmeo por Havajo, Pearl Harbor.

La delegacion reprezentis Alta Bonzo Macunaga Kaĵi de Budhisma Skolo Tendai, kaj li ankaŭ estis la reprezentanto de la Budhista Komitato de la Mondfederacio, kies 26 membroj ankaŭ ĉeestis en ĝi.

Ankaŭ Fumio Ŝiŝino, la alta servanto de Ŝintoisma Sanktejo kaj la direktoro de la komitato promcii kulturajn edukadon kadre de la Japana Mondfederacio, kun 15 partoprenantoj inkluzive sinjoron Nobuhiko Higaŝikuni, la prezidanto de la komitato, ĉeestis ĝin. Entute 74 personoj konsistis la delegacion.

La 6-an de decembro, 2016, la delegacio vizitis la templon de la Budhisma Skolo Ŝingon, Ŝintoisman Sanktejon Konpira kaj Katolikan Preĝejon en Havajo. Sur la bolarcita ŝipo Arizona, kiel nacia memoro, de la insulo Oahu la komuna preĝo Usono-Japana Memora estis kondukita de japanaj kaj usonaj religiulaj grupoj.

NEWS

The 35th Peace Prayer Delegation to Hawaii

Reviewing the past and verifying the future to open the gates.

Creating world peace through cooperation between Japan and America.

The World Federation of Japanese Religious Committee - (President Tsunekiyo Tanaka, Chief priest of Iwashimizu, Shinto Shrine).

During December 5th to December 9th, 2016, the 35th peace prayer delegation was held in Hawaii with 33 participating Committee members. Including, Rev. Hajime Matsuda, Chief of

the Kameoka Oomoto Centre, Japan.

2015 makes 75 years, three-quarters of the century since the start of the Pacific War, with the Japanese Navy attacking Pearl Harbor.

Lead by Venerable, Matsunaga Kaji (Tendai Buddhist), The World Federation for Japanese Religious Committee and The World Federation for Japanese Buddhist committee attended. Totalling 26 representatives.

Also mentioning Rev. Fumio Shishino, director of The World Federation Japan for the promotion of the cultural education committee, with 15 people including Mr. and Mrs. Nobuhiko Higashikuni, president of the committee. As many as 74 representatives participated in this Peace prayer delegation.

December 6, 2016 the delegation visited a Shingon Buddhist temple, the Konpira shrine and the Catholic Church in Hawaii. On Oahu Island a joint US-Japan Memorial service was conducted by Japanese and American religious groups at the moorings of the Arizona National Memorial.

The names of the sailors who died aboard the



The USS Arizona Memorial



Januaro 2017

Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)

No.13 / 01.01.2017

NOVAĴO

La ŝipanaj nomoj, kiuj mortis sur la ferdeko de Arizona okaze la atako de Japanaj Mararmeo, estis gravuritaj sur la muro interna de Usona Ŝtata Ŝipo Arizona Memora (USS Arizona Memorial). Loka Katolika pastro oferis preĝon en himno korusa. Tiun sekvis la preĝoj Ŝintoismaj kaj Budhismaj.

Reverendo Haĵime Macuda enĉerpis la naturan akvon el Ajabe en la maron kaj preĝis la pacon. Tie oni ankoraŭ eblas vidi likantan oleon elpenetri de la subakvigita USS Arizona.

USS Arizona Memora ĉe la Haveno Pearl Harbor en Honolulu, Havajo, estas la restita loko, kie 1,102 el 1,177 ŝipanoj kaj marsoldatoj estis mortigitaj. Reĝ-brunan ŝipkorpon ni povas vidi de la videjo. Ĝi reprezentis la altecon de usona fiero antaŭ la milito, sed la nacia fiero subite malsupreniris post la atako, kaj monumento estis restita por la rememoro.

Je la 7-a kaj duono atm., la 7-an de decembro, ĉirkaŭ 4,000 personoj, kelkaj eksaj gesoldatoj, la familioj de la viktimoj kaj personoj envolvitaj de la milito kolektiĝis al la Haveno Pearl Harbor por rememori la militon. La delegacio okupis la lokon en tiu ĉi evento.

Jackreen Assyuwell, la ĉefo de Arizona Memora salutis. Kaj Harry Haris, la Ĉef-Komandanto de Usona Armeo de Pacifiko, emfazis, ke ni devas atente konfirmigi la pasintecon kaj samtempe ni estas respondeca konstrui la pacan estontecon. Ĉi tio estas la fundamento por realigi pacon.

Ĉiu ĉeestanto donis silentan preĝon ĝuste je la 7-a kaj 55 minutoj atm. Je tiu horo Japano mararmeo neatendite atakis la havenon Pearl Harbor. Reverendo Cunekijo Tanaka faris preĝon por paco, menciante sian senton doni tiun preĝon, ĉar dum 35 jaroj li ĉeestis ĉi tiun.

Li ĉeestis en la religiula kunveno okazinta en la Katedralo Sankta Johano Disĉiplo en Novjorko, 1982,



NEWS

Arizona are inscribed on the wall inside the USS Arizona Memorial. A local catholic priest offered a prayer while a Choir was performing a hymn. After this, Shinto and Buddhist followed suit.

Rev. Hajime Matsuda poured natural water from Ayabe in to the sea and prayed for peace. It was still possible to see leaking oil seeping from the sunken USS

Arizona.

The USS Arizona Memorial, at Pearl Harbor in Honolulu, Hawaii, marks the resting place of 1,102 of the 1,177 sailors and Marines killed. A reddish brown hull can still be seen from the viewing platform. It represents the height of American pride before the war, the nation's sudden depression after the attack, and a monument of remembrance.

On December 7th, 7:30AM, approximately 4000 people some, ex-serviceman, women, families of victims and persons involved with the military gathered at the Pearl Harbour military base for a memorial service. Seated at this event were the Japanese delegation.

Jackreen Assyuwell, Head of Arizona memorial greeted Harry Harris, Chief Commander of the US Military Pacific Ocean. It was emphasized that we should carefully understand the actions of the past and at the same time understand that our actions will be to secure a peaceful future.

All the attendee's gave Silent prayers at 7: 55AM sharp. This was when the Japanese Navy made a surprise attack on Pearl Harbor. Rev. Tsunekiyo Tanaka made a peaceful prayer, mentioning he felt privileged to give a prayer at Pearl Harbor, because for 35 years we have attended this.

Rev. Tanaka had attended religious gathering held at the St. John Divine in NY in 1982, while returning to Japan he visited Hawaii to console the spirits of the



Januaro 2017

Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)

No.13 / 01.01.2017

NOVAĴO

kaj survoje al Japanio li vizitis Havajon por konsoli la spiritojn de la mortintoj. Tiu estis la komenco de lia pilgrimo al la Haveno Pearl Harbor por 35 sinsekvaj jaroj. Por krei veran pacon ni devas helpi reciproke mano en mano tenante lecionojn de la historio. Li ricevis elstarajn aplaŭdojn post lia parolado.

En la fino de la ceremonio sur la ferdeko de ŝipo por porti aviadilojn ŝipaj militistoj en blanka vestaĵo salutis dum ĉasaviadiloj montris akrobatajn flugojn kiel simbolon por la forpasintoj.

Posttagmeze ili iris al Kaneohe, la sidejo de Usona Mararmeo, kaj faris pilgrimojn al tri monumentoj, la komandanto Iida, la viktimo de ŝipaj militistoj de Usono, kaj la viktimoj de insulo Ioo. En la sidejo troviĝas tiuj memoraj monumentoj.



Rev. Hajime Matsuda poured natural water from Ayabe in to the sea and prayed for peace.

for the deceased.

That afternoon they moved to Kaneohe, the US Marine Corps base making pilgrimages at three Memorial monuments, Commander Iida, a victim of the US Marine's, and the victims of Iwo Island, these are Memorial monuments on this base.

NEWS

fallen. This was the beginning of his pilgrimage to Pearl Harbor for 35 consecutive years. To create true peace, we must help each other hand in hand retaining lessons from history. He received an outstanding applause after his speech.

At the end of the ceremony on the deck on an Aircraft carrier, naval servicemen in white saluted while jet fighters conducted a flyover as a symbol

Zamenhof-festo okazis la 4-an de decembro, 2016, kun 50 partoprenantoj

Tokihiko Asada, la prezidanto de EPA, donis malferman saluton. Sekve kelkaj lernantoj de meza lernejo prezentis demandojn kaj repondojn pri d-ro L.L. Zamenhof. Kaj raportoj pri tri kongresoj estis: pri La 64-a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo, La 103-a Japana Esperanto-Kongreso, kaj La 101-a Universala Kongreso de Esperanto. Kaj koruso de Esperanto, deklami la paroladon de d-ro L.L. Zamenhof, bildo-rakonto estis prezentitaj. La ferman saluton faris s-ro Mikihiro Kine.



The Annual Zamenhof Festival was held on December 4th, 2016 with 50 participants.

Tokihiko Asada, the president of EPA made a greeting and then conducted a Quiz on Dr. Zamenhof by some junior high school students. The reports on the Kansai Esperanto congress, Japanese Esperanto Congress, and The world Esperanto Congress were given. Then chorus of Esperanto, recitation of the speech by Dr. Zamenhof, a Picture story was conducted. At the end of the Festival Mr. Mikihiro Kine made the closing greeting.